


# Gazeto Andalusia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

12a Jarkolekto \*

Januaro, 1995

N-ro 41



## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

### ENHAVO

Efika Esperantismo / 8	3
Klarigoj	5
Kiel aŭskulti pli bone?	8
La Kosmologio de Martinus	10
Financa Bii lanco de AEU, 1994	11
Lingva Angulo	12
Poezia Angulo	16
Mi pensas, ke mi pensas erare	18
Intervjuo al Antonio Alonso	20
Enigmoj	22
Esperanto Aplikata	24

Nova jaro, nova ekzemplero de *Gazeto Andaluza*. Vi povos legi cele al informado kaj al edukado, vi povos profiti nian anoncetojn, ĝui poemojn kaj enigmojn (kaj eĉ gajni premion!)

Kaj nia poŝtkesto daŭre atendas viajn ... protestojn, instigojn, aplaŭdojn, kunlaborojn...

**Efika Esperantismo / 8**

Vere, nia tempo estas konfuziga. La grandaj idealismoj de la pasinta jarcento tute malsukcesis.

La irado de la historio ne estas tiel simpla, kiel oni imagis. Nia dudeka jarcento spertis du mondmilitojn, la rusan komunisman revolucion, ĝian bankroton kaj tion des pli grava, la malkovron de la atomenergio kaj ties apliko la atombombo.

Unuafoje en la tuta homara disvolvigo, nova ĝenerala milito riskas la pereigon de la homaro. Unuafoje en la historio de la mondo, tiu jam estas materie unuigita kaj neniu povas resti flanke de la tutmondaj okazaĵoj. Ĉiuj el ni, eĉ kontraŭvole, estas samsortuloj, ĉu pri prospero, ĉu pri ruiniĝo. Tamen, neniam antaŭe en la mondo oni ĝenerale ĝuis pli altan vivnivelon; neniam antaŭe estis tiel efikaj rimedoj de komunikado, ekde la aviadiloj ĝis la radio kaj televido. Nuntempe, la mondo fariĝis tiel hejmeca, kiel se ni ĉiuj vivus en malgranda vilaĝo. Laŭvide, ni devus konsideri nin bonsortuloj, ĉar la vivado neniam antaŭe estis pli facila ol nuntempe.

Certe, ke estas ekonomiaj krizoj, ankaŭ estas senlaboreco kaj malgrandaj militoj, kaj eĉ granda parto de la homaro restas subevoluinta kaj mizera, kiel ĉiam. Sed senpartia analizado de tiuj problemoj faras, ke oni ne povas konsideri tiujn problemojn eterne nesolveblaj, nur mankas klara koncepto pri ilia aranĝo kaj aldone la bonvolemo, tiel same individua kiel kolektiva, por ilin solvi. Neniam antaŭe la estonteco povis esti tiel esperiga, kiel nun.

Unuafoje en la tuta tempo la homaro estas materie unuigita, sed tio ankoraŭ ne estas enkapita de la homamasoj kaj eĉ de la plej multaj intelektuloj.

Nia nuntempo ne estis antaŭvidita de la intelektuloj de la pasinta jarcento. Fiaskis la romantikistoj, kiuj antaŭvidis arkadiojn, kaj fiaskis la nomataj historiaj materialistoj, kiuj promesis aliajn diktatorecajn arkadiojn. La homaraj problemoj entute ne estas tiel simplaj, kiel oni imagis, inter ili la sociala problemo kaj eĉ la simpla problemo de konkorda kaj libera kunvivado. Integrismoj, fanatismoj ĝenas la konkordan kunvivadon kaj ofte la libereco deflankiĝas al diboĉemo.

Neniam la homoj estis tiel konfuzitaj kiel nun. La tradiciaj kredoĵoj ruiniĝis, la grandaj idealoj fiaskis kaj la homoj statas en krizo de valoroj, nur celas la materialan bonfarton kaj agas individue. La socio perdas sian gluigan moralan forton. La popoloj fariĝas homamasoj kaj estas forportataj de neraciaj pasioj.

Kion faras la plejmulto? Antaŭ la timo de necerta estonteco, pli rigardas la pasintecon, ol la estontecon. Kiam la landlimoj devus esti abolitaj, oni revas pri malgrandaj ŝtatoj, ĉiu el ili kun pura etno, kaj celas etnan kolektivan identecon, kiu reale neniam ekzistis, kaj se eĉ ekzistantaj, ne estas indaj de celado. La idealigita pasinteco neniam ekzistis.

La disdivido de la nuna socio en grafolandojn, kiel en la mezepoko, estas nedezirinda retroiro al la pasinteco; estas pli ol fiasko, estas propravola ruiniĝo. Okazas, ke la socia kunvivo baziĝas sur la kulturo, kaj tiu, kiel la lingvoj, ankoraŭ estas historia same diversaj, rezulto. ili ĉiuj estas historia



La homaro sed spirite restas estas necese aboli la nek la ordinaraĵojn kiel la lingvo

materiale unuiĝis, disa. Certe, ne tradiciajn morojn kutimojn, sed Esperanto,

kiel supernacia, povas kaj devas kunvivi kun ĉiuj lingvoj, ankaŭ aparte de ĉiuj naciaj kaj etnaj kulturoj, devas disvastiĝi superkulturo por spirite unuiĝi la homaron. Zamenhof al la lingvo Esperanto aldonis la homaranismon, kiel plifortigitan esperantismon.

La vojo al la estonteco restas nebula kaj riska. La eŭropa unuiĝo malrapide antaŭeniras. La homara unuiĝo ŝajnas neatingebla.

Kio mankas? Mankas tutmonda patriotismo, kiu superu la naciajn kaj tiel same la etnajn. Mankas tutmondan kulturon. Estas necesa tutgloba civitaneco, civitana planeda konscio, intelekta kaj scienca planeda opinio, kaj super ĉio tio, politika opinio tutmonda.

Jen la granda kultura tasko por unuiĝi la homaron.

Precize, tiu tasko estas la tasko de la esperantismo, kiu alportas la supernacian lingvon Esperanto kaj tiel same la spiriton de la homaranismo.

Socialaj ideologioj fiaskis, politikoj fiaskis. Ili ne taskis la spiritajn faktorojn. Nuntempe alvenis la tempo de la esperantismo, kaj ni certe sukcesos!

Giordano Moya

## Klarigoj

Ĉu pro nescio, ĉu pro deziro damaĝi Esperanton, de tempo al tempo neesperantistoj eldiras frazojn kiuj konfuzigas. Krome, ĉe ni estas kiuj opinias, ke la E-movado funkcias ekskluzive per iliaj klopodoj kaj malestimas alies agadon, kaj eĉ pensas ke esperantistoj apartenantaj al iuj sociaj grupoj malsamaj al la sia ĝenas la *verajn* esperantistojn, ĉar defendas aliajn idearojn. La identigo, erara identigo, de Esperanto kaj ties movado al socia grupo al kiu necese apartenas la esperantistoj kaŭzis gravajn difektojn kaj ĝenis la disvastigon de nia lingvo.

Kompreneble, kaŝe aŭ malkaŝe, unu el la karakterizoj de grandega nombro de esperantistoj estas ilia progresemeco. Dirante tion mi ne intencas neniigi la ĉeeston de konservatuloj en Esperantujo. Tamen, mi estas certa ke ĉiu esperantisto decidis lerni la lingvon ĝuste pro malkonsento kun la siatempa lingva politiko kaj la troa influo de iu nacia lingvo.

Ankoraŭ hodiaŭ, eble pro nia kulpiga silento, estas personoj kiuj opinias, ke Esperanto estas *danĝera* kaj pro tio estas necese

ataki ĝin politike. Temas pri kiuj egalas Esperanton al *ekskluziva kaj natura* esprimilo de komunistoj nur ĉar iam aŭskultis, ke ĉi lastaj uzis inter ili ĉi lingvon okaze de persekutoj.

### Organizoj

En Esperantujo kunestas ĉiuspecaj ideologiaj grupoj. Protestantoj, katolikoj, ateistoj, samseksemuloj, bahaanoj, komunistoj, anarkiistoj, konservatuloj, maldekstruloj, biblianoj, evangelianoj, kvakeroj, mormonoj, oomotanoj... havas siajn respondajn E-organizojn kaj tio pruvas la neutralecon kaj mankon de ekskluziveco en Esperantujo. Io tute normala, ĉar kvankam pro iuj konkretaj cirkonstancoj, Esperanto estas/-is uzata de personoj por atingi siajn grupajn celojn, ĉi lingvo (sam'kiel la ceteraj de la mondo) estas *per se* neŭtrala homa esprimilo.

### Diktaturoj

La plej malbona socia etoso por Esperanto estas la diktaturaj reĝimoj, ne gravas ilia koloro. Faŝismoj, totalitarismoj, radikalismoj estas politikaj sistemoj kies respondaj gvidantoj agadas kun absoluta povo. En Hispanio, la E-movado tre suferis dum kaj post la intercivitana

milito. Sennombraj samideanoj mortis kaŭze de ĝi kaj en 1939-40 ĉiuj esperantistaj rondoj (escepte de Frateco, en Zaragozo) malaperis en nia lando. Poste, la vekigo de la Movado en 1946 ne okazis ĝuste pro la tiama politika reĝimo, sed pro la premado de la socio mem kiu ne plu eltenis la senigon de la civitanaj rajtoj. Hitler komprenis tuj, ke la E-movado malhelpis la altrudon de lia politika kaj socia sistemo. Tial, ruze kaj persiste klopodis malaperigi ĉiun Esperantan signon kaj ties ŝpuron. Ĉar en lia lando tiam tre viglis la Movado, li komence ne atakis ĝin fronte. Oni profitis la troviĝon de naziaj esperantistoj en la tiamaĵ E-organizoj por malfortigi ilin de interne en la Germana Esperanto-Federacio (GEA) kaj per la stariĝo kaj funkciado de *Neue Deutsche Esperanto-Bewegung* (NDEB, Nova Germana Esperanto-Movado). Bedaŭrinde, la naiveco de GEA kaj la perfido de NDEB tre efikis en la ruinigo de la Movado dum la regado de Hitler. La bazaj

kontraŭdiroj inter la Interna Ideo kaj la Naziismo kondukis necese al tia rezultato: la malpermeso de Esperanto.

Stalinismo ankaŭ ne akceptis la Movadon. Se en la unuaj momentoj de la Februara Revolucio memvideblis prospero de Esperanto pro ĝia utileco cele al la diskonigo eksterlande de la ŝanĝoj okazintaj en Soveta Unio, poste, kiam la registaro komprenis ke la libera, sencenzura komunikado de sovetanoj kaj eksterlandanoj ebligis la informadon pri la malkontentiga situacio politika, ekonomia kaj sociala de la lando, Esperanto estis malpermesita. Krome, Stalin neniam aprobintus, ke Esperanto anstataŭigu la rusan kiel internacia lingvo.

Ĉi okaze, la ĉefaj rolantoj estis, krom la responda registaro, Esperanta Komunista Internacio (ESKI), kies pluekziston la Centra

*Preskaŭ ĉiu, kiu gravas en Esperantio  
abonas al*

## **EVENTOJ**

*Ĉu ankaŭ Vi?*

*Petu senpagan provexempleron:*

*pk. 87, H—1675 Budapest,  
Hungario*

Komitato de la Rusa Komunista Partio malpermesis en 1921 verŝajne konsiderante ĝin sekteca entrepreno; Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU) kiu dekomence sin konsideris organizo reprezentanta la esperantistojn de Soveta Unio; kaj Proleta Esperanto-Korespondanto (PEK) kreita por aktivi la korespondadon, kondiĉe ke la respondo al la demandoj de la eksterlandanoj akordiĝu ĉiam al tio, kion la Partio volis, ke oni sciu. Rezultato: akra persekuto de esperantistoj fare de la registaro. Similaj situacioj travivitaj en aliaj landoj pruvas ankoraŭfoje la senpravecon de kiuj identigas Esperanton kiel lingvon de maldekstruloj kaj komunistoj. Ankaŭ ne pravas, kiuj opinias ĉi lingvon la homa esprimilo de konservatuloj kaj kapitalistoj. Tamen, ne malofte, pro politikaj

motivoj, oni lanĉas ĉi specajn onidirojn celante senprestigiĝi personojn kaj instituciojn kiuj hazarde parolas Esperanton kaj samtempe defendas kontraŭan ideologion.

Kvankam ne ĉiuj, jen iuj elementoj por helpi la leganton konjekti la evoluon de la afero en tri landoj en konkreta etapo de ilia historio. Al interesitoj mi rekomendas la legadon de tri gravaj verkoj kie la aŭtoroj pritraktas la temon abunde: *Esperanto en Perspektivo*, de Ivo Lapenna, *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins kaj *Analoj de Hispana E-Movado* de A. Marco Botella, ĉar defendi E-on estas agrabla tasko por ajna samideano kaj nia kapabliĝo realiĝas preskaŭ ekskluzive per la studo.

Andrés Martín



La redakcio de *Gazeto Andaluzia* denove avertas vin: se vi ne trovas kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleton. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzio. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota) aŭ klare tajpita.

## Kiel aŭskulti pli bone?

Konsiloj de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio.

Ni prezentas kelkajn simplajn konsilojn pri la aŭskultado de kurt-ondaj radioelsendoj.

*Radoricevilo.* Kontrolu, ĉu en via radioaparato estas la ondolongoj, kiujn uzas koncerna radiostacio; se ne, laŭeble havigu al vi tian aparaton; ĉe la aĉeto petu fakulon, ke li/ŝi helpu vin elekti laŭeble bonkvalitan radoricevilon kun bendoj de mallongaj ondoj.

*Skalo.* Ne en ĉiu radioaparato troviĝas skalo kun bonaj ciferaj indikoj; se ĝi mankas, surgluu laŭlonge de la skalo mallarĝan paperstrion, sur kiu antaŭe signu per liniilo milimetrajn kaj centimetrajn distancojn; post la trovo de ĉiuj lokoj de certaj disaŭdigoj, notu en via kajereto la horon, ondolongon en metroj aŭ kilohercoj kaj milimetran lokon (ekz. 15.30 h - 41 m. - 23-a milimetro dekstre); tiamaniere pli poste vi tre facile tuj trovos nian radiostacion.

*Kurento kaj baterioj.* Se vi uzas retkurenton, kontrolu, ĉu la tensio ĉiam estas ĝusta; se ne, uzu stabiligilon (ĝi estas pliigilo de elektra energio, se tio estas necesa). Se vi uzas bateriojn, ne forgesu laŭbezzone enmeti, enfiksi novajn, ĉar

ili ja eluziĝas kaj tiam la ricevilo povas malboniĝi; la samo validas por akumulatoro, kiun de tempo al tempo oni devas reŝarĝi.

*Anteno por la meza ondo.* Kutime ĝi troviĝas en la aparato mem; por plibonigi la akceptadon iom turnu la aparaton dekstren aŭ mal-dekstren laŭ la vertikala akso kaj elektu plej taŭgan pozicion; se vi havas porteblan aparaton, vi povas proksimigi ĝin je 3-4 cm al ŝtopilingo de kurento-reto, ĉar kelkfoje per tio plifortiĝas la ricevado de mezondaj elsendoj. Vi eventuale povas meti la aparaton sur metalan platon (ekz. en la kuirejo), aŭ proksimigi al la fridujo aŭ konvektilo, ĉar kelkfoje per tio plifortiĝas la ricevado.

*Anteno teleskopa.* Se la teleskopa anteno estas eltirita kaj la ricevado ne estas tamen kontentiga, provu *unue* - nur proksimigi vian manon al la anteno, tamen ne tuŝante ĝin (kelkfoje tio helpas); *due* - tuŝu per fingro la antenon, iafoj per tia tuŝo la akceptado pliboniĝas, ĉar la homo mem fariĝas kroma anteno; *trie* - prenu la aparaton per mane (kun la eltirita anteno) kaj delikate, por ne rompi la eltiritan antenon, iom klinu ĝin aŭ eĉ metu horizontale kaj iom-post-iom turnu vin ĉirkaŭ via akso por elekti la plej bonan



direkton; *kvare* - kun la aparato, kies anteno estas elirita, malrapide iru tra la ĉambro, iom promenetu, aŭ eĉ vizitu najbaran ĉambron, por trovi lokon, en kiu la aŭdebleco ĝenerale estas pli bona. Tre ofte, ekzemple, en la loko kie kruciĝas la subteraj akvovejnoj la ricevado estas pli bona, samkiel post la pluvo, tempesto aŭ neĝado.

*Ekstera anteno.* Se en la aparato mankas anten-ŝtopilingo, alfiksu la kablaron al la teleskopa anteno kaj senmovigu ĝin; la alian finaĵon alfiksu ekz. al metala anso de fridujo, konvektilo, akvotubo (la lokon de la alfikso nepre purigu per tranĉilo por forigi rustaĵon aŭ farbon); kiel provizora anteno ekstera povas servi kelkmetra kupra drato (kablo), kiun oni alfiksu al la radioaparato kaj la alian finaĵon pendigu poste ekster la fenestro, ekz. sur via balkono. Ĉio ĉi estas provizoraĵo, la veran eksteran antenon, kiu konformas al via aparato, certe helpas al vi radioteknikisto, sed eĉ tiuj provizoraĵoj ege helpas sufiĉas por ĉiam.

*Fado.* Se en la troviĝas aŭtomata (arangaĵo, kiu kompensas la vi havas) du aparatojn ekz., akceptu la bendo 41 m, kaj la 49m; tre ofte okazas, elsendo fadas, dum en aŭdebla.

Tre ofte la aŭdebleco varias de lokoj de la sama urbo aŭ de la unua kaj deka etaĝoj la malsama; kutime, ju pli bonal Se tamen nenio

ekzamenu vian aparaton, kiu jam estas eluziĝinta, malnova kaj estus utile aĉeti pli modernan.



antennon, kiu konformas al  
instali fakulo-  
menciitaj  
kaj kelkfoje tute

aparato ne  
fadkompensilo  
aŭtomate  
fadadon), uzu (se  
kurtlongondajn  
samtempe, unu,  
elsendon en la  
alia - en la bendo de  
ke en unu bendo la  
la alia bendo ĝi estas tute

tago al tago, eĉ en du  
la sama domo, ekz. en  
aŭdebleco estas  
alta, des pli  
helpas, tiam

Andrzej Pettyn  
el *Eventoj* 1/majo 94

## La Kosmologio de Martinus

Martinus-Instituto, el Danlando (Mariendalsvej 96, DK-2000 Frederiksberg) planas eldoni (ekde januaro) novan revuon *Kosmos* en esperanto pri la Kosmologio de Martinus. La Martinus-Instituto eldonas aŭ respondecas pri eldonado de la kosmologiaj verkoj de Martinus en diversaj lingvoj. Ili jam sukcese uzis esperanton dum prelegvojaĝoj pasintjare. Jen kelkaj informoj pri Martinus kaj lia kosmologio.

### La Kosmologio de Martinus

Martinus estas dana verkisto kaj filozofo (1890-1981).

La Kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondon. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo ĝis galaksistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reinkarniĝo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj mallumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo. Tio estas la provizora celo de la evoluo.

La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la Kosmologio de Martinus ne havas ian ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu intereso fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta homama kapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreos internacian pacan mondregnon.

Studado de La Kosmologio donas helan kaj pozitivan vivsistemon.

La kosmologio de Martinus estas logika vivklarigo, kiu donas logike bazitajn respondojn pri la fundamentaj demandoj de la vivo.

Ĝi kondukas al optimisma vivrigardo, kaj ĝi donas bazon por harmonia kaj simpatia rilato al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Per tio ĝi kontribuas al progresigo de humana evoluo.

La kosmologio estas destinita absolute nur al tiuj homoj por kiuj ĝi estas inspira. Plejparte ili estas humanaj materiistoj.

Ĉiu unuopa interesito povas konsideri la kosmologion kiel vivteorio por tute libera studado.

Ĉiu povas mem prijuĝi ĝin surbaze de siaj propraj spertoj kaj propraj inteligento-, sento- kaj intuicikapabloj. Neniu sentu sin ligita de io ajn alia ol sia propra koncepto.

La kosmologio plene konformas al la finaj rezultoj de fizika scienco. Cetere, la kosmologio montras, ke malantaŭ la ŝajne nelogika enhavo de la mondreligioj troviĝas multe pli grandaj kaj tute klaraj intelektaj perspektivoj. Tial la verkoj de Martinus havas kiel ĉefan titolon *La Tria Testamento*.

Kio la kosmologio ne estas: Neniel la kosmologio devas esti nova kredoformo; oni ne devas varbi adeptojn, kaj ne troviĝas iaj ajn ceremonioj rilate al ĝi; neniel ĝi devas esti bazo por unuiĝoj aŭ alia formo de membreco; la kosmologio ne devas influi homojn kontraŭ iliaj propraj interesoj kaj deziroj.

### Financa Bilanco de AEU, 1994

Enspezoj		Elspezoj	
Saldo je 31-12-93	+266053	Poŝto	17220
Ordinaraj Kotizoj	98275	Círculo Mercantil	5000
Instruado	38714	Ĉe papervendejoj	14005
Rentumoj	159	Fotokopioj	52070
Jarenspezoj	137148	Ŝparkaso	1065
Entute	403201	Ĉe librovendejo	15123
		Kongreso HEF	3500
		Jarelspezoj	107983
<b>Saldo favora</b>	<b>+295218</b>		



Caja Postal de Ahorros	287507
Kaso	7711
Entute	295218

Malago, la 31-an de decembro, 1994

## Lingva Ĵunglo

### Parto 1<sup>a</sup>: PROBLEMOJ: LA ESPERANTA ALFABETO

La nuntempa E-alfabeto konsistas de 28 literoj (5 vokaloj a, e, i, o, u; 21 konsonantoj: b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, h, ĥ, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, v, z; 2 duonkonsonantoj: ŭ, ĵ).

La Esperanta alfabeto estas latina, sed sen la konsonantoj q, w, x kaj y, kaj ankaŭ eslava, pro la *ĉapelita* akcento sur kelkaj latinaj konsonantoj kaj pro la *duoncirkla* signo sur la ŭ. Tiaj akcentoj estas nomitaj *supersignoj*.

La nuntempa E-alfabeto estas fonetika; tio estas, la literoj estas bazitaj sur la fonetiko per la normo po unu sono (fonemo), unu litero (morfemo), per unu signo, kaj inverse.

Jam ekde la komenco de la naskiĝo de la lingvo (1887), multaj esperantistoj proponis al Zamenhof diversajn reformojn de la lingvo, speciale forigi la supersignojn, pri la akuzativo, ktp. Do, Zamenhof diras "Kiel mi promesis en n-ro 12 de *La Esperantisto* 1893, mi nun komencas sisteman analizon de nia tuta lingvo", kaj prezentis la 5an reformon de la lingvo ĉe la revuo *La Esperantisto*, en 1894.

### PROBLEMOJ KUN SUPERSIGNOJ

Dum la 19a jarcento la problemoj de la supersignoj estis rilate al la malfacileco ne nur por manuale skribi la lingvon, sed, pli grave, por la kompostado de libroj, broŝuroj, kaj revuoj. Dum la 20a jarcento tiu problemoj pligrandiĝis ĉar alvenis novaj teknikaj avantaĝoj:

1) Tajpado. Ek de la komenco de la 20a jarcento aperis la skribmaŝino. La problemoj por supersignoj devenas el diversaj kialoj:

a) La klavaro de tiuj maŝinoj estas, a priore, formitaj de latinaj literoj.

b) Ĉe specialaj skribmaŝinoj oni povas meti akcentojn sur la vokaloj, sed ne sur la konsonantoj.

2) Telegrafio. La telegrafio havas ankaŭ kelkaj problemoj por skribi la supersignojn; la telegrafia alfabeto havas ankaŭ latinajn literojn; do, ĝi ne havas la supersignojn. Post multaj jaroj, la E-telegrafistoj sukcesis por, ke oni asignus 5 ĉapelitajn literojn (ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, kaj ŝ), sed ne la "duoncirklan" akcenton por la ŭ. Nu, ĉar la telegrafistoj ĝenerale ne komprenas tiujn literojn, la

sendado de ĉi-tiuj signoj per telegrafio estas ankoraŭ problemo.

3) La moderna kompostado  
Kiel diras Lienhardt, la supersignoj "Ne ekzistas en iu ajn alia lingvo, do ne estas trovebla en la granda plimulto da presejoj... Precipe la kvin ĉapelitajn konsonantoj (kun cirkumfleksio) kaŭzas ĝenan teknikan problemon ofte nur tre malfacile solveblan".

Konsekvence, estas malfacile eldoni revuojn, ĵurnalojn aŭ librojn en Esperanto, se oni volas utiligi la plimultajn presejojn, kiuj komponas per moderna fotokompostado

4) Komputado. Post la dua mondmilito aperis la komputado, kiu havas la plej grandan problemon por la supersignoj. Efektive, la komputilo havas tri ĉefajn fakojn: klavaron, ekranon, kaj procesilon. La klavaro estas simila al la klavaro de tajpmaŝino. La ekranon reproduktas, ĉe tekspirilaboroj, la literojn tajpitajn sur la klavaro (sistemo WYSWYG), sed ne aŭtomate; ekzemple, kiam vi havas "makrojn" por reprodukti la ĉapelitajn literojn per la tekspirilaboro *WordPerfect*, vi ne vidas ĉi-tiujn sur la ekranon, sed nur post la printado de la teksto. Tamen, vi povas fiksi la vizon per

iu komando.

Aliflanke, la plimultaj da softvaraj programoj ne havas la supersignojn. Nur kelkaj tekspirilaboroj (*Wordperfect*, *WordStar*, *Word*, ktp) povas akcepti *makrojn* por la ĉapelitaj literoj, sed ankaŭ kun limoj.



Parto 2<sup>a</sup>: EBLAJ  
S O L V O J .  
PROPONOJ POR  
SOLVO



Zamenhof ĉe *Fundamento de Esperanto* proponas la *hokismon* por eliri la supersignitajn literojn. "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u"

Pro diversaj kialoj, kiel diras W. Gilbert, "La Esperantistoj tre malofte uzis tiun eblon, kio ŝokas la Esperantan lingvosenton".

Se ni, esperantistoj, ne laboras por solvi ĉi tiun problemon, la E-lingvo riskas perdi sian unuan pozicion sur la aliaj internaciaj lingvoj, do malvenki en la lukto por la konkurenco kun lingvoj kiel Volapuk, Ido, Occidental, ktp, speciale anstataŭ Interlingua aŭ novlatina lingvo, kiu estas tre uzata por multaj sciencaj kaj teknikaj revuoj, ekzemple en Usono.

Kelkaj solvoj estas nombrataj de Albert Lienhardt:

- 1) Simple forigi la supersignojn.
- 2) Forigi la supersignon de ŭ, kaj glitigi la cirkumflekson de la ĉapelitaj konsonantoj sur la dekstre najbaran vokalon.
- 3) Forigi la supersignon de ŭ, kaj anstataŭigi la cirkumflekson per apostrofo, metota post la koncerna konsonanto.
- 4) Anstataŭigi la ĉapelitajn literojn per literoj ne-ĉapelitaj (ekz-e ĵ per ĵ) aŭ per digramoj (ekz-e ĉ per ch, ŝ per sh, ĵ per jh)
- 5) Anstataŭigi la ĉapelitajn konsonantojn per la Zamenhof-aj digramoj ch, gh, hh, jh, kaj sh, sed proksimigante ties literojn laŭeble unu al la alia, por ebligi al la legantoj distingi pli facile, en la koncernaj vortoj, la digramon disde la unuopaj literoj.
- 6) Anstataŭigi la vortojn, kiuj enhavas ĉapelita(j)n litero(j)n, per neologismoj ne enhavantaj tiajn

literojn...



#### MIA PROPONO

Mi observas, ke la vortoj kun supersignoj estas tre maloftaj ĉe la E-vortaro, kaj ankaŭ kelkaj ĉapelitaj vortoj povas skribiĝitaj dumaniere, kiel ekzemple: "ĉilo" kaj "ĥilo"; "ĝazo" kaj "ĵazo", ktp. Ankaŭ, la ĉapelita "ĥ" povas esti anstataŭita de la "k", kiel, ekzemple, ĉiuj vortoj derivataj el la radiko "Arki-" = "Arĥi-: Monarkismo = Monarĥismo, Anarkiismo = Anarĥiismo, ktp.

Do, mi proponas tion:

- a) Forigi la supersignojn.
- b) Subteni la normon: "po unu litero, uno fono per unu signo".
- c) Uzi la saman "c" por ambaŭ E-"c" kaj "ĉ", ĉar ambaŭ havas similajn sonojn.
- d) Anstataŭigi la E-

duonkonsantojn "j" kaj "ŭ" per la E-latinlitero "y" kaj per la novlitero "w", respektive. Do, la E-pluralo "j" estos anstataŭigita per "y".

e) Anstataŭigi la E-literojn "ĝ" kaj la "ĵ", je tre simila prononco, per la dtiam libera litero "j".

f) Anstataŭigi la E-literon "ŝ" per la latinlitero "x".

g) Anstataŭigi la E-literon "ĥ" per la E-literon "k".

h) Anstataŭigi la E-digramojn "kv" aŭ "gv" per la digramoj "ku" aŭ "gu", respektive.

#### KONKLUDO

Jam pasis pli ol cent jaroj ekde Zamenhof esprimis sian proponon por forigi la supersignojn. Ankaŭ aperis multaj aliaj internaciaj lingvoj, kiuj ne nur ne havas supersignojn, sed ankaŭ konkuras kun Esperanto por esti internaciaj. Do, ni devas faciligi la lingvon per forigo de la supersignoj, kaj per aliaj reformoj, por la pli bona disvastigo de la lingvo.

Konsekvence, mi opinias, ke oni devas kolekti la opinion de esperantistoj sur la tuta mondo per kompleta enketo. Poste, la rezultoj, rekte procezataj de komputoroj, estos la bazo por ke granda komisiono de filologistoj povu decidi la korektan solvon.

Luis Ojer

#### NOTO DE LA REDAKCIO

Jen vi povis legi artikolon pri kiu oni povas konsenti aŭ malkonsenti. En la venonta numero de *Gazeto Andaluza* vi povos legi artikolon malan, kiu montros al vi aliajn flankojn de la afero.

La redakcio nur volas kontraŭdiri la samideanon Ojer pri tio, ke de tri jaroj ni havis nenian problemon verki ĉi tiun revuon per komputilo (dum preskaŭ du jaroj pere de Macintosh—komputilo, kaj nun pere de PC).

## Poezia Ĵungulo

### KRONO DE SONETOJ PRI ESPERANTO

IV

Unuan muzikaĵon de l' estont'  
Ni ĉiuj kaptu per sentema aŭdo  
Ĝi sonas kiel ĉarma lulrakont'  
Ofendus kiun fremda krudaplaŭdo.

Ĝi fluas melodie de sur mont'  
Sonante nur kun delikata plaŭdo,  
En sia vastaera horizont'  
Kantadon ĝi similas de alaŭdo.

Ho ĉiuj aŭdu, kiel sonas gut'  
Post gut' falanta ofte -po minut'-  
De nia lingvo ema apogei.

Por kreku tiu apogea ton',  
Alkantu ĉiuj ni po eta son'  
Kaj helpu ĉiuj Esperanton krei.



V

Ho helpu ĉiuj Esperanton krei  
El plej malgrandaj eroj de la mond'.  
Ni ĉion ajne eblan por idei  
Enigu al trezora ĝia fond'.

Por ke ne povu la labor' pere  
Plejege zorgu pri interna rond',  
El kiu daŭru vaste spontanei  
De nia lingvo parolada ond'.

Mi scias, ke per pruntepren' ekstera  
De fremda ornamaĵo degenera  
Progresas nur kaduka vivkomfort'.

Al Esperanto nur per nutro kruda  
El la interno de la korpo nuda  
Maturas ega senrivala fort'.



VII

Vi, Esperanto, estas mia prismo,  
 Tra kiu vidas mi el mia ĉel'.  
 Tra vi mi vidas nigron de abismo,  
 Tra vi mi vidas blankon de ĉiel'.

Kun vi konverĝis mia organismo  
 Kaj eble do pro tiu paralel'  
 Mi mem en mia stranga egoismo  
 Reflektas Esperanton en malhel'.

Ĉu estas mi individu' unika,  
 Ĉu nura homarar', senkvalifika -  
 Kaj kiun rolon ludas mia vers'?

Mi mian koron nur konscias bone  
 Batadi samregule unutone  
 Kun la grandega kor' de l' univers'.

IX

Pli ol iamaj formoj idiomaj,  
 Pli ol nacioj ĉiuj sur la ter',  
 En nova mond', en blovoj  
 bonaromaj  
 Vastiĝu nova gento en prosper'.

Klasikan belon de l' artistoj Romaj,  
 Teknikon de vapor', elektro, fer',  
 Altecon de Nov-Jorkoj altadomaj  
 Superos tiu gento en konker'.

En tiu ĉi barbara veninvado  
 Kuniras mi, soldato-kamarado,  
 Kaj portas mi anstataŭ kruda glav'

La belan lingvon por homaro tuta,  
 Por ĉiu hom' ne estu surdemuta,  
 Ne estu plu de la naturo sklav'.

*N.V. Nekrasov (1900-Dua Mondmilito), ruso, redaktoris Juna Mondo (1918-1919), verkis kritikajn studojn pri originala esperanta literaturo kaj multe tradukis poezion.*

### **Mi pensas, ke mi pensas erare**

Estas evidente, ke la modernaj komunikiloj metas en nian hejmon la plej diversajn novaĵojn el la tuta mondo, kaj samtempe oni montras al ni la vivformon de multaj landoj. Oni povas diri, ke trankvile sidantaj en nia hejmo ni trakuras la tutan mondon. Nun restas scii, ĉu ĉio prezentata antaŭ ni estas realo. Eble vi jam imagis, ke eĉ se kaŝe, mi aludas al la fama televido. Nu, mi ripetas, ĉu ĉio, kion ni vidas per tiu mirakla aparato estas realo, aŭ, ĉu ĝi estas fikcio? Poste, kiam ni jam havas ĉi tiujn du konceptojn, restas ankaŭ por scii, kie komenciĝas la realo, kaj kie la fikcio.

Alia aspekto grava estas scii, ĉu la televido servas por kulturigi la homojn aŭ por ilin konfuzi kaj eĉ ilin senkulturigi? La problemo ne estas tiom facila, nek havas kontentigan solvon. Ofte la televida spektanto restas, kvazaŭ en vakuo, sen propra kriterio, kaj estas eĉ momentoj en kiuj li pensas al nenio. Ĉi tiu momento estas ege grava por la homa menso, ĉar ĝi estas tereno tute preta por akcepti, kiun ajn semon. Ankaŭ povas okazi, ke la spektanto troviĝas antaŭ la televidaparato kun plena kaj propra konvinko pri tio kion oni prezentas al li. Sed, kio okazas, kiam konstante, kiam ĉiutage li/ŝi spektas similajn programojn? Ĉu lia/ŝia kriterio restas tiom firma, kiom en la unua tago? Ankaŭ povas okazi, ke la daŭrigo de similaj programoj kreas en la menso de la spektanto opinion, kiu deviigu lin de lia propra kriterio, kaj lia menso akceptos, ke ĉio vidita respondas al io reala.

Tiu longa antaŭparolo, estas enkonduko por ke mi pli facile eksponu, kio okazas al mi, kiam mi spektas tiujn usonajn filmojn pri koruptaj policistoj, mortigistoj, drogoj, frenezaj aŭtomobilaj kuradoj kaj opinioj pri la negra raso. En epoko, kiam la filmoj komencis prezenti la indianojn kiel sovaĝajn estaĵojn, multaj, mi kuraĝas diri, la plej granda parto de la kinemuloj, akceptis tiun kriterion, nur pro tio, ke la kino konstante prezentis tiun problemon sammaniere. Tiumtempe la penso de ĉiu knabo estis mortigi indianojn, eĉ en la lernejoj oni avertis pri la sovaĝeco de la indianoj kaj negraj triboj el Afriko. Nun ŝajnas, ke la homaro aŭ parto el ĝi rekonscias kaj pensas, ke se iuj estis sovaĝaj, ĝuste tiuj ne estis la indianoj aŭ la negroj.

Hodiaŭ tiom abundas tiuj filmoj, en kiuj la perforto estas ilia nura fundamento kaj filozofio, ke racia kaj honesta homo devas sin demandi: ĉu tio estas realo? Kaj en tiu industrio pri la kino-perforto Usono troviĝas en la pinto, kaj en tre alta pinto. Vi jam scias, abundas filmoj pri la perforto. Mortigoj estas la ĉefaj rolantoj. Oni inventas la plej rafinitajn mortigilojn. La fanfaronado de tiuj,

laŭdire, kinartistoj estas senmezura, ilia detrukapablo estas senfina kaj la deziroj de multaj spektantoj, precipe junaj, estas ilin imiti.

La industrio pri la mortigoj en la kina arto verŝajne donas kontentigajn profitojn, kaj Usono bone scias ekspluati tiun novan orminon.

Mi pensas, ke tio ja vere ne povas okazi en tiu lando. Ke ne povas ekzisti tiom da koruptaj policistoj, ke ne povas abundi tiom da mortigoj, tiom da masakroj, ke la mono ĉion putrigas, ke tiom abundas revolveroj, ke la negroj ne ĉiam estas la kulpantoj de ĉio malbona, ke tiuj surstrataj pafadoj ne respondas al la realo, kaj tiuj fanfaronuloj, kiuj mortigas homojn kvazaŭ kulojn, estas pura fantazio, ke tiuj ŝteladoj estas imago de la filmodirektoro, ke tiuj seksaj perfortoj ne estas veraj, ke eble oni prezentas la usonan justecon, kiel ege malbone organizitan, ke konfuzo ekzistas en multaj mensoj. Al tiuj fantaziaj bildoj, frukto de la *varmaj* cerboj de la kinindustrio, oni aldonas aliajn, kiuj estas fakte veraj. De tempo al tempo oni anoncas al la mondo masakron fare de iu frenezulo.

Antaŭ la televidaparato mi havas mian propran kriterion kaj ĝis nun tiu kriterio restas ĉiam fidela, neŝanĝita; mia menso ne estis kaptita de tiuj usonaj violentaj filmoj. Kvankam pri la realaj faktoj, same perfortaj, mi havas propran opinion. Jes, mia penso restas klara, hela. Sed mia imago flugas. Mi pensas, ke tio, ion rakontas tiuj usonaj filmoj ne estas vero, sed mia imago flugas al tiu lando kaj vidas Usonon, kiel unu el la plej danĝeraj lokoj por vivado. La konstanta spektado de tiuj filmoj, pensigas min, ke en tiu lando trankvila vivo estas ege malfacila. Mia kriterio restas fidela, mia penso neŝanĝiĝas, sed tamen mi vidas tiun landon en plena dekadenco.

Sed mi pensas, ke tio ne povas esti, ke en tiu lando ja ekzistas homoj bonaj, honestaj, sinceraj kaj ke vivi en tiu lando sendube estas granda plezuro. Tamen la ombro semita de tiuj



## Intervjuo

Jen vi povas legi la respondojn de konato de la hispana Esperanto-Movado, Antonio Alonso Núñez, kiu ankaŭ kunlaboros kun nia revuo ekde la venonta numero.

*Gazeto Andaluzia:* Kiam vi konatiĝis kun la lingvo Esperanto?

*Antonio Alonso:* Mi naskiĝis en 1929, do mi estas jam nun 66-jarulo. Kiam mi estis ĉ. 8-jara, mi ie legis aŭ aŭdis la vorton *Esperanto*. Mi demandis mian patron pri la afero (profesie li estis modesta ŝuriparisto, tamen surprize klera, i.a. pri matematiko), kaj li diris al mi pli-malpli la jenon: "Filo, mi ne bone scias pri tio; ŝajnas, ke post multaj alies nesukcesaj provoj, iu homo sukcesis konstrui lingvon facilan kaj neŭtralan, tiel ke ĉiu povas ĝin ellerni, kaj do komunikiĝi kun ĉiuj homoj el la tuta mondo". Por mia infana menso tiu fakto fariĝis hela, korvarmiga ebleco, kaj de tiam mi ĝin gardas senŝanĝa.

*GA:* Kiel vi kontaktiĝis kun la E-Movado?

*AA:* Kiam mi estis ĉ. 16- au 18-jara mi unuafoje trovis E-libron en brokantejo (temis pri la lernolibro de Soler), studis

ĝin, kaj iom poste, sciiginte pri la ekzisto de HEF, mi aniĝis al ĝi.

*GA:* Ĉu vi konsideras vin E-verkisto?

*AA:* Ne, mi ne estas E-verkisto (kiel ankaŭ mi tio ne estas en la hispana nek en la galega), sed nura E-uzanto. Mi pensas, ke mi sufiĉe bone sukcesis pri informado en Galegio pri Esperanto, sed neniel pri varbado.

*GA:* Kiu estas la plej grava mesaĝo de nia lingvo?

*AA:* Laŭ mia kompreno, la kerna mesaĝo de Esperanto estas: "Jen la mesaĝo: Pere de E-o ni povus ĉiuj facile kaj neŭtrale interkomunikiĝadi". Temas, do, pri la eldiro kiun mi unuafoje aŭdis de mia patro, kaj kiun cetere eldiradis ankaŭ Zamenhof kaj aliaj gravuloj, kvankam preskaŭ ĉiam ili pli laboris aŭ reliefigis pli konkretajn celojn.

Mi bone scias, ke por iuj E-uzantoj tio estas malriĉa kaj kripliga aserto, sed ja aliaj,

inklinaj al sociologia kaj filozofia cerbumado, trovas ke tia eldiro konsistigas fruan kaj plian konkretan ekzemplon de la fama kaj plej ĝenerala eldiro de MaLuhan: "La mesaĝo estas la rimedo mem" (t.e., ke la ĉefa mesaĝo disportata de la modernaj, tre potencaj komunikad-rimedo, ja estas ĝuste, ke tiuj rimedoj ekzistas, kaj ke tial jen ili troviĝas je nia dispono por ke ni efike kaj riĉige agadu pere de ili).

GA: Kion devus fari la Ŝtatoj koncerne E-on?

AA: Pri instruado kaj uzado de la lingvo, la afero estas por mi klara: (a) La instruad-sistemoj devus ebligi ke ĉiu, kiu volas ellerni E-on, tiu povu tion fari kadre de la sistemo, kun egala nivelo kaj valoro, kiel la studado de kiu ajn alia fremda lingvo. (b) Post ellerno, nenia problemo ŝprucus ĉe privata uzado, ĉar ĉiu povas agi tiurilate laŭ sia propra plaĉo. (c) Pri uzado en internaciaj renkontiĝoj kaj similaj aferoj, ja ke oni permesu oficiale uzi Esperanton al tiuj, kiuj tion volas fari, kaj ja en egaleco de leĝa valoro, atentado per tradukado en aliajn lingvojn, ktp, kiel pri ĉiu alia oficiala lingvo.

GA: Kiu estas la plej grava ero de la Esperantaj aferoj?

AA: Pri la fakta vivo de E-o? Nu, mi povas nur ripeti, kio laŭ mia kompreno estas la kerna mesaĝo de Esperanto, kiel supre dirite: ĉiuj aliaj, pli konkretaj aferoj kaj laboroj, kiaj la interna ideo de E-o kaj la paca kunvivado de homoj kaj de popoloj, aŭ jen nur-praktikaj-celoj (komercado, politiko, scienco, la diversaj niveloj de klerigado), literaturo, lingva kaj kultura komunumo en memelektita diasporo, sen-naciismo, ktp, ktp, ja estas plej valoraj kaj fierigaj eroj el la vivo de Esperanto, sed ĉiu el ili aparte estas nura parto de la de la ĝisnuna tuto -kaj, laŭ mia espero, la estonta tuto ja estos gigante pli granda.



Kaj ja estas bone, ke ĉiu agadu pere de Esperanto ĝuste en tiu kampo (jen tuteca aŭ jen nur parteca), kiu speciale altiras ĝin kaj por kiu li aŭ ŝi estas pli kompetenta kaj pli dotita.

GA: Dankon, Antonio, pro ĉi tiu intervjuo kaj pro viaj onta kunlaboro.



## Enigmoj


Denove temas pri 8-diferenca enigmo: ni proponas al vi, ke vi trovu la 8 diferencojn kiuj ekzistas inter la du imagoj apudaj. Se vi trovos ilin, sendu al la redaktoro fotokopion de via solvo, kaj oni lotumos inter la sendintoj libropremion. (Limdato: la 15a de majo ĉi-jara.)



Inter la solvosendintoj, ni lotumis premion (libron, tradukon de Becquer, aŭ diskon de Solo). Kaj ĝin gajnis kaj ricevos

Luis Serrano Pérez

La premio ĉi foje vojaĝas al Sabadell, kie ĝi atingos nian samideanon komence de aprilo. Gratulon al li kaj kuraĝon al ĉiu! Ek al la solvado!



... daŭrigo de la paĝo 19

filmoj kreas en mia penso tiun bildon, kiu prezentas tiun grandan landon kiel veran perversan loĝlokon. Ofte kaj rilate al ĉi tiu temo mi pensas, ke mi pensas erare, sed mi jam ne kulpas...

Mi esperas kaj deziras, ke iom post iom malaperu tiuj filmoj pri la perforto. Hodiaŭ Usono semadas tre malbonan bildon pri si mem. Ne ĉio en la vivo estas mono, nek ĉio dependas de la mono. Eĉ en la filmoj devas ekzisti etiko, por ne

detru la menson de la junaj generacioj. Oni ne povas semi tempestojn, ĉar la rikolto estos ŝtormoj senmezuraj.

Luis Serrano Pérez



## Esperanto Aplikata

**PSIKIATRO.** José Luis Pérez Óvilo,  
Avda Juan Carlos Y, 1-6<sup>o</sup> B  
30008 Murcia, Hispanio.

**HUMANISMO.** Centro de  
Comunicación Humanista,  
Pasaje de Mármoles, portal 4,  
local 7, Malago, Hispanio. Tel:  
261-31-91.

Amikoj kaj entreprenistoj el  
diversaj profesioj de la tuta  
mondo estas bonvenaj al  
Guangzhou por trakti  
marmangĝan komercadon kun  
Lin Zhongxin, prezidanto de  
Guangzhou-a Mangĝa Limigita  
Kompanio Fuge kaj Komerca  
Limigita Kompanio Fuweida, kaj  
Zhang Fuge, ĝenerala  
direktoro. Adreso: S-ro Fang  
Yungzang, F/2, 631 Longjin  
Zhong Lu, CN-510140,  
Guangzhou, Ĉinio. Tel  
(020)8811396, 8812342,  
fakso (020)8811396,  
8883202.

**SENPAGE** aperigu vian  
anoncon sur ĉi tiuj paĝoj!  
Sendu ĝin al nia adreso,  
*Gazeto Andaluza*, AEU,  
Poŝtkesto 864, E-29080  
Malago, Hispanio.

Mi vendas aparaton por presigo  
de etiketoj, adresoj, titoloj de  
artikoloj, ktp. P-touch, Brother  
Modelo PT-BE. Apenaŭ uzata,  
ĝia prezo en la butiko 22650  
ptoj. Mi ĝin ofertas je 15000  
ptoj. Mi ankaŭ kunsendas du  
bendojn. Luis Serrano Pérez,  
Font Nova 32, 08202 Sabadell  
(Barcelono) Por Hispanujo mi  
pagos la sendokostojn; por for  
de Hispanio, la aĉetanto devos  
pagi ilin.

En 1993 la Zaozhuang-a E-  
Asocio de Shangdong-provinco  
kaj la Verd-stela Kompanio por  
Scienc-teknika Eksploato de la  
urbo kune fondis la tutlandan  
verd-stelan informreton kaj  
decidis eldoni la gazeton *Verd-  
Stelaj Informoj*, kiu servas ĉefe al  
e-istoj. La gazeto estas destinita  
por doni informojn pri la ĉina  
ekonomio, transdono de  
patentitaj teknikoj kaj internacia  
kunlaboro.

Konata Kimra pentristo Roberto  
Parker-Munn presigis laŭ sia  
oleaĵo poŝtkarton *Kvin katoj* en  
la lingvoj kimra, angla kaj  
Esperanto. Li apartenas al la  
internacia grupo *Rondo Kato*,  
kaj nun ofertas sian artan kaj



reklaman servojn por firmaoj. Faru viajn mendojn al Roberto Parker-Munn, Nantyrhebog Farmhouse, Glynbrochan Llanidloes, Powys, Wales, Britio S478 6PJ.

Oficialaj tradukoj el la angla hispanlingven. J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Ankaŭ tradukas el la franca kaj germana en esperanton aŭ en la hispanan. Tradukoj prilaboritaj per komputilo kaj presitaj altkvalite.

*Akcesoraĵoj, kiuj parolas internacian lingvon* estas la slogano de vendejo nomata *Esperanto*, en Minneapolis, Usono. La geproprietuloj Louise kaj Robert Fontaine elektas objektojn kun distinga stilo kaj arta valoro el pluraj landoj, inkluzive de Ĉinio, Turkio, Hindio, Hungario, Francio, Usono, k.a. Aĉeteblaj varoj inkludas ĵuvelaĵojn, vestojn, manĝilarojn, ludilojn en formo de remburitaj bestoj, metiartaĵojn kaj meblojn. Gesinjoroj Fontaine, ĉe la vendejo, disdonas faldfolion pri E-o al butikumantoj, kiuj scivolas la lingvon. Adreso, Esperanto, 910 Nicollet Mall, Minneapolis, Minnesota 55402, Usono.

Por akceli la aplikon de Esperanto en la turisma servo, la Xi'an-a Internacia Turisma Kompanio *Pactur* en la provinco Shaanxi starigis Esperanto-Sekcion, kiu esperas, ke ĉinaj kaj alilandaj Esperantaj organizoj kaj individuoj kunlaboros kun ĝi, kaj bonvenigas esperantistojn al Xi'an.

Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz sendas du librojn de Allan Kardec, koniginto de Spiritismo (*La Libro de la Spiritoj kaj la Libro de la Mediumoj*, kaj *Almanakon Lorenz*, kontraŭ jarkotizo de 30 dolaroj aŭ respondkuponoj. Adreso: Caixa Postal 3133, 20001 Rio de Janeiro, Brazilo.

Kiel verki Esperantlingvan tekston per via vortlaborilo *WordPerfect 5.1?* Helpe de ZAMENHOF.WPK vi povos entajpi iun ajn esperantlingvan tekston rapide kaj facile. La dosiero haveblas ĉe J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Prezo: 750 pesetoj (plus sendokostoj).

Ĉe ni estas multaj favoraj politikistoj por ke eksterlandanoj investu en nia loko. Ni

bonvenigas eksterlandanojn vojaĝi kaj investi en nia loko. Vi ricevos koncernan informon kaj helpon senpage, se vi skribos al Tan Dehong, Nogmu Jiaoyuzu, Songzi, Hubei, Ĉinio.

Mi volas fondi kompanion aŭ fabrikan en orientaj eŭropaj landoj. Ni esperas, ke esperantistoj aŭ E-organizoj en Eŭropo povos helpi nin kiel nia peranto por registri en koncernaj departementoj. Nia registrmono povas esti 10000-100000 USD. Bonvolu kontaktiĝi kun Song Zibin. Adr.: 83 Sheng Li Lu, Bengbu, 233000 Anhui, Ĉinio.

ESPERANTOTUR, Turisma Servo de *Monda Turismo*. Landaj reprezentantoj en 52 landoj. Vojaĝoj tra la tuta mondo. Kontaktadreso en Hispanio: Francisco José Dávila Dorta, Apartado 39, E-38080, La Laguna, Tenerife. Adreso de *Esperantotur*, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando. Tel: +48.52.415744; fakso +48.52.460082. Telekso 562844 MTUR PL.


*MOVLO*, Turisma Oficejo por Esperanto-Aranĝoj kaj

Informado. Nia firmao certigas por ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo kaj por ĉiuj Grupoj Eksterlandaj, gvidata pere de esperanto vojaĝgvidanton, agrablan ripozon kaj en Esperanto-medio, kaj en ia ajn revita loko de Hungario. Ni organizas ekskursojn al diversaj landoj. Ni okupiĝas per internacia komercado de Esperanto-eldonaĵoj. Oficiala lingvo de *Movilo* estas Esperanto. Adreso: 1157 Budapest, Nyírpalota Ut. 107, Hungario.

NOVTUR, Turisma Oficejo. Por viziti Pollandon kaj restadi en tiu lando. Ekskursoj tra la plej pitoreskaj lokoj, kurac- kaj ripozrestadojn en famaj kuraclokoj, partopreno en tie okazantaj kultur- kaj folkloraranĝoj. Adreso: str. Włókniarzy 22, PL 34-120 Andrychów, skr. Pocz. 30, Pollando.

Ĉi tie oni povus legi VIAN senpagan anoncon. Sendu ĝin al la redaktoro.

# Antwerpen '95



Turisma kaj gastronomia renkontiĝo

12a, 13a, 14a de majo 1995

D O K U M E N T O J   D E   L I G O   D E   N A C I O J

La Propono de 1920 renoviĝis al la Dua Asembleo.

La 9an de septembro 1921, okaze de la Dua Asembleo de la Ligo de Nacioj, estis renovigita en identa formo la propono de 1920.

Pri la bezono de facila komuna lingvo en la Ligo de Nacioj D-ro Nitobe inazo, la tiama Subsekretario de la Ligo, skribis:

"En multaj landoj la elekto de delegitoj por la Konsilo aŭ por la Asembleo estas limigita al la tre mallarĝa cirklo de tiuj, kiuj povas regi la anglan aŭ francan almenaŭ kun relativa facileco, kaj kutime -ĉar tiu ĉi cirklo konsistas el diplomatoj, profesiaj lingvistoj, lernejoj instruistoj kaj komercistoj - multaj el la plej kompetentaj por la laboro de la Ligo de Nacioj estas preterpasitaj. Kiam la paroladoj estas farataj en kunvenoj en lingvo ne komprenata de ĉiuj, iuj membroj emas forlasi la salonon aŭ fariĝi senpaciencaj...

(...)

Nur en Eŭropo 49 lingvoj estas nuntempe uzataj. Inter la 48 membroj de la Ligo funkcias ne malpli ol 48 apartaj lingvaj sistemoj, se oni ekskludas iujn gravajn dialektojn. Plue, kiam la angla kaj franca estis akceptitaj kiel praktike la solaj lingvoj pro kaŭzo de ekonomio, kiel diras la Raporto de la Komitato, tiu decido signifis ŝajnan ekonomion el mallarĝa vidpunkto rilate ŝparadon de tempo kaj mono por traduko. Mondvasta vidpunkto de ekonomio rezultigos tute alian juĝon...El vidpunkto de monda ekonomio neniu rimedo estos pli racia kaj pli malmultekosta ol la adopto de komuna lingvo." ( El la Raporto de D-ro Nitobe rilata al la rezultoj de lia oficiala partopreno kiel observanto de la Ligo en la 21-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en aŭgusto 1921 en Prago ).

Cetere, la Dua Asembleo decidis, inter alie, meti la aferon pri instruado de Esperanto en la lernejo en la tagordon de la Tria Asembleo. La koncernan Rezolucion oni akceptis la 15an de septembro 1921.

000  
-----0000000-----  
000